LA LABORLOKA TAKSADO

La laborloka taksado estas proceso per kiu oni sisteme esploras, taksas kaj solvas endanĝerigojn kaj sanecajn ŝarĝojn ĉe la laboro.

LABORKVALITO ESTAS VIVKVALITO

- La laboro signifas por preskaŭ ĉiu homo vivparton elementan kaj gravan.
- La laboro elĉerpas nian energion kaj ŝarĝas nian organismon. Akcidentoj povas sekvigi seriozajn konsekvecojn.
- Se ni volas konservi longtempe nian sanon, niajn kapablojn kaj la vivĝojon, ni devas utiligi niajn reservojn zorge kaj response.
- Sekve la kvalito de nia laborloko influas esence nian vivkvaliton.
- Laborsekureco kaj sanprotekto en la laborejo estas atingeblaj nur kune!

LA INSTRUMENTO DE LABORLOKA TAKSADO

- Por atingi maksimuman laborlok-kvaliton la leĝo postulas, ke la entreprena responsulo sisteme esploru kaj taksu ĉion endanĝerigon kaj sanec-ŝarĝon, kiuj tuŝas la laborantajn homojn.
- Surbaze de la rezultoj taŭgaj aranĝoj estu fiksitaj.
- Tio ĉi tuta proceso estas nomata “laborloka taksado”.
- La rezultoj de la esplorado kaj la planitaj aranĝoj por eviti la endanĝerigojn estu fiksitaj skribe en la tiel nomata “sekureca kaj sanprotekta dokumento”.
- Endanĝerigoj kaj sanecaj ŝarĝoj povas havi diversspecajn kaŭzojn; ekzemple:
  - maŝinoj kaj laboriloj
  - kemiaĵoj kaj radiado
  - bruo kaj skuado
  - streĉo kaj tempopremo
  - laborloka klimato kaj lumigo
  - korppozicio kaj manipulado de ŝarĝaĵoj
- Ne ĉiuj homoj estas same ŝarĝeblaj. Sekve oni aparte atentu pri la specifaj endanĝerigoj por senspertaj aŭ protektbezonaj laborantoj, ekzemple junuloj, graveduloj aŭ handikapuloj.
- La ĉefa celo estas kontraŭagi endanĝerigojn jam ĉe la fonto.
- Se ne eblas eviti endanĝerigojn aŭ ŝarĝojn, tiam la laborprenantoj estu protektataj per:
  1. teknikaj aranĝoj (ekz.: protektiloj)
  2. organizaj aranĝoj (ekz.: maniero de la laborado)
  3. personrilataj aranĝoj (ekz.: persona protekt-ekipaĵo)
- La limtempo kaj la responsuloj por la realigo de la necesaj aranĝoj estu fiksitaj en la “sekureca kaj sanprotekta dokumento”.
- Ĉiu kunlaboranto devas esti informata pri danĝeroj por la sano kaj sekureco same kiel pri la aranĝoj por riskpreventado.
- Laŭleĝe la labordonanto respondecas pri la rezulto.

Sed: Nur se ĉiu koncernata persono partoprenas aktive en la proceso de la laborloka taksado, plibonigoj estos atingeblaj.

LABORRETO EN LA ENTREPRENO

- Ĉiu laboranto en la entrepreno influas per sia agado kaj la ekonomian potencon kaj la laborkondiĉojn.

- Leĝaj reguloj donas al certaj personoj specialajn taskojn rilate al la laborsekureco kaj la sanprotekto.

- Ĉiuj kune formas laborreton por ekkoni kaj eviti endanĝerigojn kaj ŝarĝojn ĉe la laborejo.



- Ankaŭ eksterentreprene diversaj organizaĵoj ofertas subtenon; ekzemple:

  - la ĝenerala asekurejo kontraŭ akcidento
  - la ekonomia ĉambro
  - la ĉambro por laboristoj kaj dungitoj
  - la gildoj
  - la sindikatoj ktp.

KION MI POVAS FARI POR PLIBONIGI MIAN LABORMEDION?

- La propra laborloko estas la plej bone konata:
  ☞ Observu ĝin kaj estu atenta!

- Nur konata problemo solveblas:
  ☞ Malkaŝe parolu pri observaĵoj!

- Per propraj proponoj mi kapablas kunformi mian medion:
  ☞ Proponu plibonigojn!

- Nur efektivigita protektaranĝo donas sekurecon:
  ☞ Atentu interkonsentojn!

- Kie oni kunlaboras, tie necesas kunordigi:
  ☞ Pensu ankaŭ pri aliaj homoj!

- Nur informita persono povas ĝuste taksi danĝerojn:
  ☞ Havigu informojn al vi!

www.arbeitsinspektion.gv.at

Eldonanto: Federacia Ministerio por Ekonomio kaj Laboro,
Sekcio por Laborjuro kaj Laborinspektejo. Vieno, Aŭstrio.
Tradukita: Aŭstria Esperanto Federacio, ZVR 065398059.

Sen garantio pri kompleteco.
Vieno 2007

ARBEITS INSPEKTION
BUNDESMINISTERIUM für WIRTSCHAFT und ARBEIT

LABORPROTEKTO

La laborloka taksado

Informilo por laborprenantoj

www.arbeitsinspektion.gv.at